

FINA KAJ KONKLUDA RAPORTO DE LA ELEKTA KOMISIONO AL LA KOMITATO DE UEA

Estimata Ĝenerala Sekretario,

laŭ la preskriboj de la Elekta Regularo, la Elekta Komisiono prezentas jenan konkludan raporton.

La Elekta Komisiono okupiĝas pri la elekta proceduro de: Komitatanoj "C", Estraro, Komitataj Reviziantoj, Financa Komisiono.

La laboro de la Elekta Komisiono direktiĝis al prezento de:

- ❖ kandidatoj por la diversaj taskoj kaj oficoj, kun aparta atento pri rolo de Prezidanto;
- ❖ teamo kiu povu kunlabori glate kaj efike;
- ❖ kapablaj homoj el diversaj mondopartoj.

La Elekta Komisiono laboris aktive kaj persiste: ĝi kontaktis vicon da eblaj kandidatoj, el kiuj kelkaj respondis pozitive, aliaj negative, iuj entute ne reagis; kun pluraj ĝi ret-mesaĝis abunde por klarigoj, sugestoj, interŝanĝado de opinioj, k.s.

Kiel vi povis rimarki en la antaŭa raporto, prezentiĝis interesaj kandidatoj kaj notindas ke granda nombro da personoj konkuras por fariĝi Komitatano C: entute 14.

Ĉe tiu ĉi punkto ni deziras aliri vian atenton al la preskriboj de la Statuto, kie - je artikolo 25 - oni legas:

"Por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj, la Komitatanoj A kaj B, povas kompletigi la Komitaton, elektante pliajn komitatanojn.....".

Ni volas ĉi tie precizigi ke la plej taŭga, oportuna kaj rekomendinda vojo al kandidatiĝo por transpreni gravajn taskojn kaj ludiorganizan rolon en UEA ne estas C-Komitatiĝo.

La Komitato konsistas el Komitatanoj A, B kaj C. Ĉi lastaj estas nemalhaveblaj personoj en la movado pro siaj sperto, kapablo, rezultoj atingitaj, konataj pro tio de komitatanoj, kaj elektitaj de Kom. A kaj B.

LISTIGO LAŬ ALFABETA ORDO DE LA NOMOJ DE KANDIDATOJ KIUJ POVAS ESTI PROPONATAJ

KANDIDATOJ POR C - KOMITATANECO

BRANCO Paulo
CHAVIGNON Philippe
DASGUPTO Probal
DELFORGE Marcel
DEMMENDAAL Loes
FRANQUESA SOLE' Josep
HERNANDEZ ANGULO Julian
HORI Jasuo
Hortensio - CHOI YUN HUY
HUĜIMOTO Tacuo
LIPARI Michela
PIETRZAK Barbara
TANTIN ACKERMANN Edvige
WANDEL Amri

La modifo (14 anstataŭ 15) ŝuldiĝas al la fakto ke Renato Corsetti malkandidatiĝis, sekve de sia nomumo kiel Kom. A fare de Itala Esperanto-Federacio.

KANDIDATOJ POR LA ESTRARO

BELLEFEUILLE Yves	kom. A
BELOŜEVIĆ Marija	kom. B
CLERICI Ranieri	kom. A
DASGUPTO Probal	kom. C
DEMMENDAAL Loes	kom. C
GUTIERREZ Maritza	kom. A
HORI Jasuo	kom. C
NOURMONT Claude	kom. A
PIETRZAK Barbara	kom. C
VERGARA Josè A.	kom. A
WANDEL Amri	kom. C

KANDIDATOJ POR „KOMITATAJ REVIZIANTOJ“

Paulo BRANCO	kom. C
Marcel DELFORGE	kom. C

KANDIDATOJ POR “FINANCA KOMISIONO”

(Komitataneco ne deviga)

Flory WITDOEKT	A - Kom.
Helen FANTOM	A - Kom.

ELEKTA PROPONO

La Elekta Komisiono tre atente kaj respondece pripensis kaj diskutis siajn sekvajn **proponojn kaj rekomendojn**. Ili estis faritaj ne facilanime, ofte, jena aŭ alia propono okazas kun peza koro kaj pardonpeto al tiuj kiuj ne estas proponitaj.

Ne estis facile kunmeti teamon, multaj estis la bonaj kandidatoj, ĉiuj bone laboris en siaj diversaj kampoj kaj meritis troviĝi en la rekomendita listo.

Certe vi demandos kial ni ne proponas pli ol unu teamo. Ni estis emaj al tio, sed konsiderinte porojn kaj kontraŭojn, ni fine decidis favore al propono de unu teamo. Nia movado, niaj celoj, bone konataj de vi ĉiuj, konsilis ke la elstare kapablaj homoj, kiuj kandidatiĝis por la bono de nia organizo, strikte kunlaboru, solidare kaj amike, sen konkurenci inter si.

La Elekta Komisiono PROPONAS KAJ REKOMENDAS ke la :

- nombro de la Komitatoj C estu 10;
- Estraro konsistu el 8 membroj, kun 2 Vicprezidantoj;
- Komitataj Reviziantoj estu du;
- Financa Komisiono konsistu el 2 membroj.

La Elekta Komisiono PROPONAS KAJ REKOMENDAS al la Komitato la elekton de **la sekvaj kandidatoj al Komitataniĝo C:**

BRANCO NEVES Paulo Antonio
DASGUPTO Probal
DELFORGE Marcel
DEMMENDAAL Loes
HORI Jasuo
PIETRZAK Barbara

kaj krome **PROPONAS KAJ REKOMENDAS** la elekton de **pliaj 4** Komitatoj C inter la sekvaj personoj:

CHAVIGNON Philippe
FRANQUESA SOLE' Josep
HERNANDEZ ANGULO Julian
Hortensio - CHOI YUN HUY
HUGIMOTO Tacuo
LIPARI Michela
TANTIN ACKERMANN Edvige
WANDEL Amri

La Elekta Komisiono proponas kaj rekomendas al la Komitato por la laborperiodo 2007-10 **la sekvan estraron**, kondiĉe ke ĉiuj 8 havos la statuson de komitatano (ĉu A, ĉu B aŭ C) je la momento de elekto, kun indiko pri preferaj agadkampoj;

unuopaj specifaj elektoj:

Prezidanto
Probal DASGUPTO

Vicprezidantoj
Ranieri CLERICI anstataŭanto de la prezidanto, homaj kaj lingvaj rajtoj, plivastigo de la tegmenta funkcio de UEA, modernigo de la funkciado de la organizo, stimulado de debatoj, planadoj

Claude NOURMONT kultura kaj kongresaj agadoj, daŭripova evoluigo de la Asocio.

Ĝenerala Sekretario
Barbara PIETRZAK

komuna elekto: Estraranoj

BELOŜEVIĆ Marija faka agado, informado, servoj al lokaj kluboj, naciaj asocioj, fakaj asocioj, individuaj membroj

DEMMENDAAL Loes Financo-Administrado

HORI Jasuo Landa agado, edukado, kulturo

VERGARA Josè A. Strategio, lingvopolitiko, movada evoluo, scienca esplorado pri E-o.

La Elekta Komisiono proponas kaj rekomendas al la Komitato la elekton de la sekvaj kandidatoj en la rolo de **KOMITATAJ REVIZIANTOJ** por la laborperiodo 2007-10:

BRANCO NEVES Paulo Antonio
DELFORGE Marcel

La Elekta Komisiono proponas kaj rekomendas al la Komitato la elekton de la sekvaj kandidatoj en la **FINANCA KOMISIONO** por la laborperiodo 2007-10

FANTOM – PRENT Helen
WITDOECKT Flory

En la aldonitaj folioj vi trovos la informojn pri la proponitaj homoj.

La Elekta Komisiono opinias ke tiuj personoj bone povos plenumi la taskojn, koncerne la ĉefajn agadojn de la Asocio, taskojn por kiuj ili mem kandidatiĝis.

Ĉiukaze estos specifa tasko de la nova Estraro mem interkonsenti kaj dividi la diversajn laborkampojn laŭ plej taŭgaj interkonsentoj.

La Elekta Komisiono
ERTL Istvan
JUG Janez
LEE Chong-Yeong
TANTIN ACKERMANN Edvige